



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 283

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au fonds normand de la Médiathèque de Caen
et à la bibliothèque de Cherbourg.

Majo 2022

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr
Korektas Dominik Cornice

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



PRENEZ DATE !

Le 15 octobre
journée touristique à
Dives sur Mer



**FRATAN SALUTON al la UKRAINAJ kaj RUSAJ
ESPERANTISTOJ kiuj NE VOLIS TIUN MILITON.**

La vorto

LES ESPÉRANTISTES NORMANDS TIENNENT BON !

La pandémie qui continue de perturber nos vies, une guerre fratricide au cœur de l'Europe et de nombreuses incertitudes sur notre avenir économique, social et environnemental pourraient nous amener à baisser les bras quant à la pratique de l'espéranto. Or, tout indique que les locuteurs de notre belle langue, au contraire, souhaitent lui être fidèles et y puiser l'espoir que contient son nom même. Ainsi dans ce bulletin régional, vous y apprendrez que Jean-Pierre compense les cours de Christian à Avranches par un cours par internet corrigé par Rémy de Carentan, que Véronique et Bertrand traverseront l'Europe à vélo dès le mois de mai et feront étape chez de nombreux espérantistes et qu'Armel artiste semi-professionnel de Cherbourg vient de sortir un C.D de ses propres chansons en Espéranto !

Enfin le groupe d'Hérouville vous prépare pour le 15 octobre une journée touristique à Dives sur Mer, ville ouvrière et de plaisance tout à la fois. Bravo également pour vos propositions d'articles qui garantissent la diversité du contenu de ce bulletin lu dans les chaumières normandes et bien au-delà.

Yves Nicolas

ENHAVO

- P. 1 enhavo, la vorto
- P. 2 Poezio (de Jacques Prévert), de la tero ĝis la luno
- P. 3 Planedo Oriono, rememoroj el Italio
- P. 4, 5, 6 Dosiero biciklado (2)
- P. 6 Tri artikoloj
- P. 7 Vagadis la kato
- P. 8, 9 Armel Amiot "Banjo Esperanto"
- P. 10 La londona klubo
- P. 11 Volontula laboro ĉe UEA
- P. 12 Nur unu literon ni ŝanĝis,
Le 15 octobre à Dives-sur-Mer

Déjeuner du matin


Il a mis le café
Dans la tasse
Il a mis le lait
Dans la tasse de café
Il a mis le sucre
Dans le café au lait
Avec la petite cuiller
Il a tourné
Il a bu le café au lait
Et il a reposé la tasse
Sans me parler
Il a allumé
Une cigarette
Il a fait des ronds
Avec la fumée
Il a mis les cendres
Dans le cendrier
Sans me parler
Sans me regarder
Il s'est levé
Il a mis
Son chapeau sur sa tête
Il a mis son manteau de pluie
Parce qu'il pleuvait
Et il est parti
Sous la pluie
Sans une parole
Sans me regarder
Et moi j'ai pris
Ma tête dans ma main
Et j'ai pleuré.

Jacques Prévert (Paroles)

Dessin Michelle Pouyadou

Matenmanĝo

Li metis la kafon
En la tason
Li metis la lakton
En la tason da kafo
Li metis sukeron
En la laktokafon
Per la kulereto
Li kirlis
Li trinkis la laktokafon
Kaj li remetis la tason
Sen alparoli min
Li ekbruligis
Cigaredon
Li faris ringojn
Per la fumo
Li metis la cindrojn
En la cindrujon
Sen alparoli min
Sen rigardi min
Li stariĝis
Li metis
Ĉapelon sur kapon
Surmetis sian pluvmanteon
Ĉar pluvis
Kaj li foriris
Sub la pluvo
Sen iu parolo
Sen rigardi min
Kaj mi enmanc
Prenis mian kapon
Kaj mi ploris



Traduko farita la 30-an de novembro 2021

Gérard Sénécal (14) gvidis la klubanojn dum la traduko

DE LA TERO ĜIS LA LUNO

Oni demandas al du sepjaraj infanoj kiuj ne havas la plej etan ideon pri la ĝusta respondo, kiu estas la distanco de la tero ĝis la luno. La infano A respondas 10 kmj, kaj B 800 000 kmj. Kiu infano faris la malplej eraran respondon ?

Malgraŭ la ŝajnoj, A malpli eraris, ĉar la ekzakta distanco estas 380 000 kmj.

A eraris je $380\,000 - 10 = 379\,990$ kmj, kaj

B eraris je $800\,000 - 380\,000 = 420\,000$ kmj

Henri ROUSSEAU (14)



Quelques nouvelles de la planète Orion :

On sait maintenant pourquoi l'espéranto est parlé sur la planète Orion. Grâce à la série OVNIS, diffusée sur Canal+.

Si vous voulez le savoir, il vous faudra regarder la nouvelle saison de 12 épisodes. Pour être honnête, il ne s'agit pas d'un grand Espéranto car l'accent de l'héroïne est perfectible mais au moins cette série a le mérite de parler et de faire parler de l'espéranto. Alors, bravo et peut-être à bientôt, pour une nouvelle saison !

Patrice DUFEU (76)



Jen kelkaj novaĵoj pri planedo Oriono:

Oni nun scias kial esperanto estas parolata sur planedo Oriono, dank' al televida serio OVNIS ("NIFOJ"), elsendata de Canal+.

Se vi volas ekscii tion, nepre spektu la novan sezonon el 12 epizodoj.

Verdire, ne temas pri modela Esperanto ĉar la akĉento de la heroino estus plibonigenda, tamen tiu serio havas la meriton paroli kaj priparoli esperanton.

Nu, brave kaj eble ĝis baldaŭ, al nova sezono!



Rememoroj el Italio

Kiam mi estis dudek jara, mi iris trajne en Italion por viziti Romon, Florencon kaj Venecion. Estis mia unua vojaĝo. Mi rezervis miajn trajnbiletojn kaj hotelojn kaj ĉio al mi aspektis bonorde. Irinte malfrue kaj kure al la stacidomo de Florenco mi lastmomente sukcesis eniri la trajnon al Venecio kaj tuj surpriziĝis pro la aspekto de tiu trajno kun belaj internaj dekoracioj, grandaj brakseĝoj, tapiŝo, belaj kurtenoj ĉe la fenestroj. Mi diris al mi «Ŝikas la trajnoj en Italio !».

Sed pli poste, mi aŭdis la kontroliston kiu petis suplementon al la vojaĝantoj.

Mi komprenis, ke mi eniris malĝustan trajnon, sed mi ne plu havis sufiĉe da mono kaj neniun bankkarton. Do, mi ŝajnis dormon kiam la kontrolisto petis de mi trajnbileton . Poste, mi diris al li « no compreno, no compreno » kaj ankaŭ « I don't understand » kiam li petis suplementon.

Mi miris, ke forirante li ne insistis sed ĉe la sekva haltejo, alvenis alia kontrolisto. Mi faris la saman

komedion, mi ŝajnis dormon kaj « ne kompreno, ne kompreno ». Ankaŭ li foriris... sed ĉe la sekva haltejo, alvenis tria kontrolisto kaj denove la sama komedio kaj samkiel la kolegoj, li ankoraŭ foriris. Mi cerbumis kaj deduktis, ke ili eliris el la trajno, sed tute ne ! La tri kontrolistoj revenis kune kaj sidiĝis sur liberaj seĝoj apud kaj antaŭ mi. Ili ekparolis kun mi, demandis de kie mi venas «Ha ! Normandio, Deauville, che bela Deauville !» ktp... La interparolo daŭris almenaŭ duonhoron, sed, dume mi timis ke ili petu denove la suplementon aŭ konduku min al la policejo.

Kiam ni atingis Venecion, unu el la kontrolistoj portis mian valizon ĝis la elirejo de la stacidomo kaj la triopo deziris al mi bonan restadon. Uf ! mi estis savita.

Finfine, ili estis tre amikemaj ! Tiam mi estis dudek jara kaj alloga junulino, ne certas ke la afero samfavore okazus hodiaŭ.

Ne senriska restado en Venecio

Mi promenadis en Venecio ĝis perdiĝo laŭ nekalkuleblaj stratetoj. Por trovi mian vojon, mi elprenis mian urban mapon kaj kontrolis ĝin dum daŭra marŝado.

Faldante la mapon mi subite konstatis ke mi estas je 20 cm de la bordo de iu kanalo. Neniu baro. Se mi farus ankoraŭ unu paŝon, mi falus en la akvon. Neniu persono cirkaŭe por min helpi. Kaj mi preskaŭ ne scipovis naĝi ! Mi tre timis kaj mi revenis ĝis la centro de Venecio per singardema palpado de la antikvaj muroj.

Véronique Charles (14)

DOSIERO BIKIKLADO (2)

Dua parto



PRI BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia – Lars Sözuër (Germanio))

En la jarŝanĝa nokto de 1979 al 1980, kunvenis kelkdek junuloj en la renkontiĝo IS (Internacia Seminario) kaj fondis esperantlingvan asocion pri biciklado.

La nova asocio ricevis la nomon BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), kaj jaron poste ĝi fariĝis la unua faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Nuntempe la ĉefa agadkampo de BEMI estas organizado de biciklaj karavanoj al Esperanto-aranĝoj. Okazas ankaŭ karavanoj al aliaj interesaj celoj.

Membroj de BEMI prezentas la asocion kaj nian lingvon en biciklaj eventoj ekster Esperantujo, kiel foiroj, manifestacioj ktp.

El tio jam rezultis diversaj novaj esperantistoj. Utilaj estas por tiuj okazoj la belaj BEMI-ĉemizoj el tre bonkvalita ŝtofo.

Ne malofte BEMI-anoj entreprenas tre longajn biciklovojaĝojn, kiuj altiras la atenton de ĵurnalistoj.

Ĝus okazis ankaŭ la Tria BEMI-semajno, dum kiu partoprenantoj ekskursas al vidindaĵoj, kaj ĉiuvespere revenas al la sama loko.

En BEMI-semajno kutime estas oferto de ekskursoj por ĉiuj niveloj de biciklemo.

Iuj membroj eĉ partoprenas en tre longdistancaj biciklosportaj eventoj kiel ekzemple Parizo-Bresto-Parizo.

BEMI estas membroasocio de ACP (Audax Club Parisien), la monda asocio de tiu sporto.

Kune kun IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-

Federacio) kaj aliaj asocioj, BEMI preparas nun du-jaran projekton pri "Daŭripova Transporto" per subvencio el la programo Erasmus+.

La diskuto pri la enhavo de tiu projekto nur komenciĝis, kaj ideoj estas tre bonvenaj.

Ĉiujn ĉi agadojn BEMI povas efektivigi sen bezono de multe da administrado.

Sekve, ne ekzistas formala membreco en BEMI, nek membrokotizo.

BEMI simple invitas ĉiujn homojn, kiuj ŝatas bicikli kaj parolas Esperanton, konsideri sin membroj.

La decida organo de la asocio estas la membrokunveno, kiu tradicie okazas dum la jarŝanĝo, elektas la estraron kaj diskutas pri la evoluo de la agado.

Krome validas la principo, ke en BEMI okazas tio, kion la membroj faras.

Se vi deziras ion fari, kontaktu la estraron, kiu subtenos vin realigi vian agadon :

bemi-estraro@tejo.org

Lars Sözuër

Vi povas aĉeti BEMI-ĉemizojn ĉe

<http://www.horizonto.net/chemizo/chemizo.html>
Mallongmanika ĉemizo kostas 39 €, longmanika 43 €.

Al tio, necesas aldoni sendokostojn (poŝto plus koverto), kiu dependas de la kvanto da ĉemizoj kaj de la lando kie vi loĝas.

Lucien PERAIRE. TRA LA MONDO PER BIKIKLO KAJ ESPERANTO (eltiraĵo)

De 1927 ĝis 1932, Lucien PERAIRE biciklis por malkovri la mondon. Li iris de Francio ĝis Japanio kaj raportis en tre fama libreto siajn eksterordinarajn aventurojn.

Se vi ŝatas bicikladon kaj estas vojaĝemaj, nepre legu tiun malmultekostan sed instruplenan raporton.

Mardon, la 11an de junio 1929

Hodiaŭ vespere mi alvenis al Kazano, ĉefurbo de la aŭtonoma Tataara Respubliko kaj fame konata universitata urbo. Miaj celoj: ĉiam la samaj, vizo de pasporto kaj precipe, riparado de biciklo. Ĉi tie mi denove provos, kion mi malsukcesis en Moskvo: konstrui aparaton por bicikli sur fervoraj reloj kaj ankaŭ havigi al mi la permeson rajdi tiel ĝis Vladivostoko.

Por komprenition, kio sekvos, mi devas iom klarigi la tiaman situacion en Soveta Siberio. De apenaŭ 12 jaroj la nova revolucio triumfis, sed, post « detruo de la malnova mondo » - kaj tio, ve, ne estas vortoludo – ĉio estas fareda kaj la rekonstruado disvolviĝas ĉie. Oficiale, viro kiel mi estis konsiderata, ne nur kiel iom freneza, sed ankaŭ kiel malsaĝulo, ne serioza kaj iom ĝena. Tamen la propagando tuŝis la amasojn kaj, kvankam "duon-f reneza", mi jam trairis la duonon de tuta Sovetio per mia nura biciklo sur abomenaj vojoj.

Krom do la amindaj popolamasoj, dekomence mia ĉefa subtenanto estis « Avtodoro », kio en rusa lingvo signifas « Asocio por Disvastigo de aŭtomobilaj vojoj kaj ĝenerale de modernaj transportaj rimedoj ». Por tiu asocio mi estas ekzemplo de obstineco kaj de espero por la estonta vojretaro. Krome jam influis la akcepto, kiun faris al mi sufiĉe famkonataj turismaj kaj sportaj kluboj, precipe biciklaj kluboj. Mi havis ankaŭ bonŝancon trovi ĉi tie ne nur lertajn

esperantistojn, sed ankaŭ sentimajn, honestajn kaj viglegajn. Se « la fido translokigas la montojn », la fido je mi ebligis al tiuj kamaradoj venki ĉiajn barojn.

Dank'al kaj helpe de gekamaradoj Anonimov, Trigulov, Skarajatin, F-ino Kisileva, dum tri semajnoj mi klopodis ĉe registaraj instancoj, Avtodoro kaj ŝtata uzineteto je meĥanika riparo. (Ni ne forgesu, ke ĉi tie ĉio estas ŝtatigita).


En tiu uzineteto la laboristoj min ovaciis kaj venkis la reziston de la direktoro; sed mi devis trovi la tutan necesan materialon... ĉe « nigra merkato », t. e. popola memstara libera merkato de brokantuloj – mi ne diras

« brokantistoj », ĉar, leĝe, metia negoco estas malpermesata. Finfine ĉio resumiĝis jene: post kelkaj tagoj la riparejo « pruntis » al mi bonegan meĥanikiston, k-don Ruĥ (Ruŝ) kun destinita nomo, ĉar ambaŭ ni impulsis la laboron... Sed en tiu laborejo mankis ĉio, eĉ marteloj.



Kaj finfine, la 22an de junio, t. e. dek tagojn poste, mia aparato estis finita laŭ mia plano. Kun k-do Ruŝ kaj kelkaj esperantistoj mi tuj iris provi ĝin sur fervoraj garaĝaj reloj. Stranga aparato... mi ne estis kapabla rajdi sur ĝi, sed knabeto, kiu tute ne scipovis bicikli, triumfe pedalis kiel ĉiampiono. Mi

komprenis, ke la malfacilaĵo venas de mi. Mi devis lerni utiligi mian novan inventon. Tiel mi faris. Mi modifis ĝin iomete kaj atentis pri kelkaj detaloj.



KIEL MI LERNAS ESPERANTON

Mia nomo estas Jean Pierre, mi havas sesdek sep jarojn kaj mi loĝas en Avranches.
Mi komencis Esperanton en UIA(Inter aĝa universitato de Malalta Normandio) kun Christian Lesveque en 2019, kaj en 2020 sed ĉi tiuj kursoj ĉesis ĉar Christian ne plu povis plenumi ilin , je mia plej granda bedaŭro.
Do mi sekvis la korespondajn kursojn fine de 2020 kun la kursaro < lkurson en dek lecionoj> kun Rémi Troisgros kiel korektisto.
En 2021 mi faris paŭzon ĉar mi multe laboris por mia domo.
Por 2022 mi decidis ĉesigi miajn kursojn en la IUA por dediĉi min nur al la lernado de Esperanto.
Do mi denove prenis korespondajn kursojn kun la kursaro < Gerda Malaperis > ankoraŭfoje kun Rémi Troisgros de Carentan kiel korektisto.
Mi jam studis ĉi tiun kurson kun Christian ĉe IUA, kiun mi trovis interesa, tial mi volis studi ĝin denove.
Mi ĵus finis la okan lecionon kaj esperas kompletigi la tuton por ĉi tiu somero aŭ plej malfrue ĉi aŭtune. Ĉi tio kun la celo regi la skribon kaj la signifon de Esperanto
Tiam, mi esperas lerni plu por asimili la paroladon ĉar mi ŝatas la signifon de ĉi tiu lingvo.

Jean-Pierre James (50)

EN ĴULUVILO, ĈARMA URBETO

Tiu rakonteto okazis en Jullouville (Ĵuluvilo) al amiko mia kiu antaŭ nelonge vidviĝis. Li volis enterigi sian edzinon en la familian tombokelon kiu jam enhavis sian bopatrino. La ceremonia enterigo estis senproblema kaj mia amiko ankoraŭ emociplena decidis aliri la tombejon ĉiu-tage. Dum unu el tiuj vizitoj, li ekvidis kelkajn tuberojn sur la tombo ankoraŭ ne surŝtonigita. Li unue supozis, ke povus esti fungoj sed post pli akuta rigardo, li furioze deduktis, ke temas pri ostoj el la bopatrina skeleto. Tre ŝokite, li kompreneble taksis la aferon skandala, ke la fosistoj tiom aĉe laboris.

Enskatolinte la videblajn ostojn, li aliris la fosistestron por plendi kaj ricevi klarigojn. La estro ĝene argumentis, ke tro ofte li devas dungi malkompetentulojn por plenumi tiun ĝenerale misfaman laboron. Por provi sin senkulpigi, li redonis parton de la entombigaj elspezoj al mia amiko.

Hejmenirante kun la ostoj, ĉi tiu survoje pripensis kion fari pri ili. Li finfine brulis la tuton en sia kameno.

Akuzi lin probable ne estus farinta la bopatrino kaj ĉio-kaze jam de longe (kaj poreterne) ŝi ne plu kapablas ! Oni tamen povas sin demandi ĉu mia amiko multe amis sian bopatrino... Vere, okazas strangaj aferoj en la ĉarma urbeto Jullouville !

Christian Lesveque (50)



Henri ROUSSEAU (14)

ASOCIA KANTO.

Kiam mi ankoraŭ povis partopreni je niaj mardaj kunvenoj, iam, dum kanta momento, mi estis sugestinta ke ni lernu pli volonte francajn kantojn ol kantojn bonajn sed ne esceptajn, tiritajn el la rusa libreto "Oraj kantoj". Mi estis substrekinta ke la fremdaj grupoj kiuj ofte ricevas membrojn de la nia, atendas de ili tipaĵojn el nia regiono, pli volonte ol slovakaĵojn, eĉ eventuale belajn, aŭ aliajn similaĵojn, kies vortoj ofte ne estas kompreneblaj pro multnombraj elizioj de vokalaj finaĵoj. Mi estis proponinta ke nia grupo lernu la kvazaŭ himnon de la Departemento Manche, la faman, patosan kaj emociigan "SU LA MÉ" (Sur la mer). Mi estis doninta kodiskon por konigi la arion, (kvankam aŭdeblan per interreto), kaj tradukinta al esperanto la parolojn. Nia bulteno NEB publikigis tiujn parolojn en sia numero 264 de Januaro 2016. Hodiaŭ, el ĝi mi ŝanĝus nur la unuan version ("Starante sur kabo Hago"), ne sufiĉe monde konata kaj tro distanca de la originala teksto ("Quand je suis sur le rivage"), per "Kiam sur strando mi staras" ...

Mi refaras mian sugeston.



Vagadis la Kato...

de la 2a de Oktobro 2021 ĝis la
14a de Februaro 2022 en Caen !

Belga Humuro far **Philippe Geluck**



Apud la turisma oficejo, mezmezura (1,1m)
Rawhajpoutachah (fakiro sur birdbekoj kiel najloj) akceptis
piedvagantojn en la interna korto de « Hôtel d'Escoville »...
Sub sunega vintra ĉielo, blankaj kat-spuroj lude gvidis al
aliaj
20 gigantaj bronz-statuoj: 5 ĉe la plezur-ŝipa haveno
(Vendeuvre Kajo)
6 sur Respublika placo, 8 antaŭ la urbodomo, kaj 1 antaŭ
« Mémorial »
(Ph-G. omaĝas al 2015-aj murditaj desegnistoj de
« Charlie-hebdo »
fare de sankta Sebastiano ligita al tortur-fosto kaj
trapikita
per 8 kolor-krajonoj sur kiuj naskiĝas 8 birdetoj).



Averaĝe 2-tunojn pezaj, 2,70-metrojn altaj, staris tiuj
kolosaj verkoj desegnitaj far Ph. Geluck, skulptitaj far Ph.G kaj
François Deboucq, fanditaj far Jo Van Geert kaj siaj teamoj.

Unuaj krokizoj de lia Kata Moŝto ekaperis
Marton-Aprilon 1983 en la belga ĉiu-taga ĵurnalo « le Soir ».
Antaŭe ekzistis marioneto Poulou (dueto « Poulou » kaj « Moka »,
kun Ph.G animanto de RTBF-televida programo Lollipop
1979-1985)...

Tiuj dikventraj bronzegoj filozofaj ilustras gravajn aktualaĵojn
per multaj acidaj, akutaj, kruelaj eĉ... rigardoj kaj grinc-humore ridigas siajn
tuŝitajn spektantojn.

Ph.G plezure tordas aŭ situaciojn aŭ popolajn proverbojn
aŭ klasikajn mitologiajn kreaĵojn aŭ homajn malvirtojn...

« RIDI, RIDETI, PRIPENSI, EMOCION KREI... »



konsultu « Le Chat déambule », far Philippe Geluck,
eldonita de Casterman

Foririnte de Caen, la 14an de februaro 2022,
la Kato vagadas
nun al Ĝenevo (Wilson kajo, de Februaro
ĝis Aprilo la 24a)

Ĝi vagadis en Parizo (Champs-Élysées,
de Marto la 26a ĝis la 9a de Junio 2021) kaj
poste en Bordojo
(Quinconces-placo, de Junio la 18a ĝis
Oktobro 2021)...

Anne-Marie Leprévost (61)
fotoj de Anne-Marie



Kantisto el Cherbourg (Armel Amiot) verkis en esperanto kaj ĵus eldonis KDon kunlabore kun Vinilkosmo

"Mi ne pagas vin por nenion fari ! " kolere bojis la redaktoro de "Normanda Bulteno " Armel estas ĵus intervjuita de Radio Basa Normandio pri siaj novaj kantoj. Novaj kantoj en ESPERANTO, skornozo, kaj nia priesperanta regiona bulteno ne estis la unua por prezenti ilin ! Ovumu kiel eble plej rapide vian artikolon se vi deziras konservi vian tro komfortan postenon ! "

Armel, peux-tu nous donner quelques éléments biographiques : âge, lieu de naissance, depuis quand à Cherbourg, profession ?

J'habite dans le Cotentin depuis très longtemps, puisque j'y suis né il y a 60 ans. J'ai vécu à Cherbourg et sa région la plupart du temps, malgré des études à Brest et une période parisienne. Je suis enseignant à l'I.U.T de Cherbourg, mais je pratique la musique en semi-professionnel depuis toujours, avec de nombreux groupes.

Quelles formations et expériences musicales as-tu ?

Mon premier groupe « solide » s'appelait PORTE 53, on faisait du rock en français, et j'étais le guitariste-chanteur. Plus de 500 concerts un peu partout dans le Grand Ouest, et 3 albums de chansons originales, de 1985 à 2006 environ...

En parallèle, je me suis tourné vers le jazz-swing avec plusieurs groupes parisiens, dont « les groove brothers », dont j'étais également le guitariste chanteur. A cette époque, j'ai fait très régulièrement la navette vers Paris, puisque j'y jouais beaucoup, notamment au Caveau de la Huchette.

A partir de 2007, j'ai ajouté le banjo à ma panoplie puisque je suis rentré dans le groupe « La Planche à Laver », composé de musiciens professionnels de ma région. Avec eux, j'ai fait d'innombrables concerts un peu partout en France, aux Antilles, et même aux USA puisque nous avons enregistré notre second album (il y en eu 3 en tout) à la Nouvelle-Orléans.

Pourquoi des chansons en créole (quels créoles). Quel public as-tu ? Chantes-tu dans d'autres langues

Dans le groupe « La Planche à Laver » (du nom du washboard, instrument de percussion usuel en Louisiane), je chantais en anglais des standards du jazz Nouvelle-Orléans, mais avions aussi des chansons antillaises, d'abord instrumentales, puis j'ai appris à chanter quelques airs en langue créole (de Martinique), ce que j'ai beaucoup apprécié.

Comment as-tu découvert l'Espéranto. Méthode d'apprentissage et depuis quand ?

J'ai découvert l'espéranto à l'occasion d'élections européennes, en lisant le programme du parti esperantiste. J'ai trouvé l'idée absolument géniale : une langue auxiliaire, très simple et qui pourrait constituer une langue commune à tous les européens, sans chercher pour autant à détrôner les langues nationales. J'avoue que l'idée m'est un peu sortie de la tête, mais quand le premier confinement est arrivé, je cherchais à renouveler un peu mes projets artistiques, alors l'idée de garder le style de banjo-chant que je pratiquais déjà, et d'écrire des chansons originales en esperanto m'a séduit.

Vois-tu un lien entre ta pratique du créole/des créoles et celle de l'espéranto ?

Pas vraiment, si ce n'est que l'espéranto a en quelque sorte pris la place du créole dans certaines de mes chansons. Par contre, je n'ai jamais cherché à réellement parler le créole martiniquais, mais à apprendre des chansons existantes. Bien sûr, j'ai demandé à des amis antillais de m'aider à comprendre les textes et à correctement prononcer les mots.



Crédit photos

Reno L.

Sur Facebook et Youtube

<https://www.facebook.com/events/507425467743772>

<http://www.youtube.com/watch?v=09Pp-2uCogE>

Ma démarche avec l'espéranto est toute autre, puisque mon projet d'écriture a été dans un premier temps d'écrire des chansons tout en apprenant la langue, avec donc une approche très naïve, un peu comme un enfant qui apprendrait à parler. J'espère bien sûr dans le futur me perfectionner en espéranto, écrire d'autres chansons, et être capable de présenter mon spectacle en esperanto.

Vois-tu des similitudes grammaticales entre les créoles et l'espéranto malgré leurs histoires très différentes ?

Comme je le disais précédemment, je ne peux pas répondre à cette question puisque mon créole se limite aux chansons que j'ai apprises ! Par contre, une certaine chaleur dans l'expression est commune aux deux langues, et on peut reconnaître des mots, ici ou là, en créole tout comme lorsqu'on débute en espéranto.

Comment comptes-tu te faire connaître en « Espérantie » et qu'en attends-tu ?

En fait je me considère avant tout comme un musicien, et si bien sûr l'espéranto est une partie importante de mon approche, je souhaite rester très présent à la musique ! En particulier, j'adore chanter et jouer mon instrument (le banjo tenor), dont le caractère musical est vraiment très caractéristique.

En fait, j'envisage deux approches : soit une approche concert avec des chansons en espéranto, mais aussi pourquoi pas en différentes langues, et l'approche « concérence » avec une partie explicative suivie d'un concert en format court. Je teste cette première approche le 8 mai à Cherbourg, ce sera une première !


Quels thèmes abordes-tu et quels styles musicaux et quels artistes ont modelé tes préférences ?

Je suis avant tout très marqué par le blues et le jazz, mais aussi par la chanson française classique. Du premier, je garde une grande exigence sur le swing et la précision rythmique, et de la seconde un goût pour les textes qui racontent des histoires ! A une époque, on me surnommait « le Keith Richards du banjo », puisque j'apportais une approche rock à cet instrument ! En parlant d'histoires, dans mes chansons récentes, j'ai abordé des thèmes divers de la vie, l'amour, le temps qui passe...

J'envisage des textes plus engagés dans la suite de cette écriture en espéranto, puisque l'artiste peut (et peut-être doit) aussi s'exprimer sur les sujets de société.

Comment s'est mise en place l'édition de ton album et que penses-tu de ta collaboration avec « Vinilkosmo »

C'est la force d'internet qui nous a réunis. Lorsque j'ai fini la maquette de ma première chanson, je l'ai fait écouter à mon complice Denis Lainé, qui s'est enthousiasmé sur le projet, et m'a réalisé un premier clip vidéo, avec de très belles images de notre côte du Cotentin. Une fois sur youtube, cette vidéo a recueilli très vite des commentaires, et en particulier de Liven Dek, qui m'a signalé quelques erreurs d'esperanto dans mes textes, et a accepté de m'aider par des relectures et corrections sur la suite du projet. C'est lui qui m'a donné le contact de Floréal Martorell de Vinilikosmo. Flo m'a tout de suite proposé son aide et c'est comme ça que tout s'est enclenché... L'équipe de Vinilikosmo a été formidable, je suis allé déjà deux fois à Toulouse pour les rencontrer, et je pense que ce n'est pas fini !



Es-tu prêt pour présenter tes différentes facettes musicales dans le cadre des tournées de conférence de Espéranto-France bloquées depuis janvier 2020 à cause de la pandémie mais pour lesquelles nous gardons l'espoir d'une reprise ?

Un tour de chauffe en Normandie serait-il envisageable ?

Oui, bien sûr, je souhaite ardemment venir partager cette musique et ces chansons, et partager le plaisir que j'ai eu à écrire et enregistrer ces chansons. Comme pour tous les artistes, la scène et la rencontre sont mes moteurs !

LA LONDONA KLUBO PROPONAS INTERESAJN PERZOOM-AJN KURSOJN

Dum la lastaj du jaroj, la kronviruso malhelpis, ke vizaĝ-al-vizaĝaj kunvenoj okazu. Estis neeble kaj kvazaŭ malpermesite renkontiĝi. La pandemio devigis nin elpensi aliajn kaj novajn manierojn renkontiĝi kaj labori.

Ni, kiel ĉiuj, do malkovris Zoom-on kaj aliajn similajn programarojn. Ni lernis uzi ilin, ni spertis iliajn malavantaĝojn, kiuj estas multaj, sed ankaŭ iliajn avantaĝojn, kiuj ankaŭ estas multaj. La komputilaj iloj certe limigas nian diskuttempon kaj malfaciligas interŝanĝojn sed aliflanke ili nuligas landlimojn: per Zoom, oni povas diskutati kun homoj kiuj loĝas ĉe la kontraŭa flanko de la planedo kaj entute esplori Esperantujon.

Helpe de tiuj iloj, tra la mondo, kluboj serĉis manierojn konservi la ligan inter siaj membroj, kaj agadojn proponi plu.

En Eruvil, Ivo instruis per Zoom al la komencantoj. Ĵiji kaj Ĵerar uzis prefere retpoŝtilon por proponi al la progresantoj kune traduki malgrandajn tekstojn pri Kaeno kaj Eruvil' kiujn Ĵerar kunigis por eldoni libreton kiun ni donos al niaj vizitantoj. Nia klubo organizis retajn prelegojn kiujn partoprenis esperantistoj el Eruvil' sed ankaŭ homoj el multaj aliaj landoj. Tiuj prelegoj estis anoncitaj per Eventa Servo (1).

Mi do alkitimiĝis rigardi kion proponis ne nur nia klubo sed ankaŭ la aliaj kluboj ĉe Eventa Servo kaj aŭskultis kelkajn prelegojn, ĉefe organizitajn de la antverpena klubo.

Tiel mi ankaŭ malkovris, ke la londona klubo estis proponanta multajn kursojn (2, 3), je ĉiuj niveloj de la KER-ekzameno, de A1 ĝis C1, gvidatajn de instruistoj el la tuta mondo.

Mi decidis aliĝi. Mi unue virtuale rendevuis kun Amanda, el Usono, kiu taksis mian nivelon. Kelkajn tagojn poste, mi eksekvis la kurson nivelo B1-B2 de Pawel, el Pollando, kaj la konversacian kurson de Fransuazo, el Francujo.

Pawel klarigis kiel oni trapasas la ekzamenon kaj proponis ekzercojn, ne nur sed precipe pri la aŭda komprena parto. Ĉar mi komencis mian kvarmonatan biciklan vojaĝon je la fino de majo, mi ne partoprenis tiun kurson ĝis la fino. Ne vere gravas, ĉar, pasintjare, pro la pandemio, ne estis organizita la KER-ekzameno.

Tamen mi opinias, ke estis tre interese renkonti

homojn el la tuta mondo kaj aŭdi multajn akĉentojn. Mi vere plibonigis mian nivelon.

Ĉi-jare, ekde septembro, mi partoprenas du kursojn. La unua estas meznivela kurso (B1-B2), gvidata de Renato Corsetti. Deko da homoj partoprenas tiun kurson. Dum la kurso, kiu okazas marde vespere kaj daŭras ĉirkaŭ unu horon, Renato klarigas gramatikaĵojn el la Fundamento, pri kiuj li sendis al ni kelkajn tagojn antaŭe klarigojn kaj ekzercojn (4).

Ni aŭdas tekston (5) kaj respondas demandojn pri ĝi. Finfine ni laŭte legas pli longan tekston. Kaj, kompreneble, ni babilas pri la okazintaĵoj en niaj respektivaj landoj.

La dua estas la skriba kurso, gvidata de Phil Housley. Ne estas preciza horaro por tiu kurso: ĉiusemajne, Phil proponas temon pri kio ni skribas kelkajn liniojn kiujn ni sendas al li. (Se la temo ne interesas nin, ni rajtas skribi pri alia temo kiun ni elektas). Li kontrolas niajn proponitajn tekstojn, korektas ilin kaj resendas ilin al ni kun siaj klarigoj. Se necese, ni povas kontakti lin por ke ni kune distuku pri la neklaraj punktoj.

Mi opinias, ke mi bone plibonigos mian nivelon dank' al tiuj kursoj.

Tio postulas tamen multe da laboro (minimуме, laŭ mi, ses-ok horojn ĉiusemajne) sed la kursoj estas tre bone gvidataj: la instruistoj estas facile kontakteblaj kaj tre respondemaj. Alia problemo - nur por eruvilaj esperantistoj - estas, ke la kurso de Renato okazas marde. Mi ne povas samtempe partopreni la kursojn kaj la renkontiĝojn en Eruvil' (kiuj plej ofte okazas ankaŭ marde) kaj mi estas tial iom forigita de nia klubo.

Tamen pri tio mi trovis la solvon por venonta jaro: mi nur devas tiom plibonigi mian lingvan nivelon, por atingi la nivelon B2-C1 kurso, gviditan de Anna Lowenstein: ĝi okazas merkrede ! Sed ve! Estas la kutima tago por la poliglota kafejo en Erouvil'.

Zoomi aŭ ne zoomi. Jen la demando...

Bertrand Verstraete (14)



1 eventaservo.org

<https://londonaesperantoklubo.com/OnlineEsperantoCourses.html>

2, 3 Tiuj kursoj estas senpagaj, nur oni petas, ke vi pagu ses eŭrojn por kovri la koston de la abono al zoom.

4 Vi povas trovi ilin sekvante tiun ligilon:

http://bonalingvo.net/index.php/La_gramatiko_de_lingvo_sen_gramatiko

5 Kutime trovebla ĉe <https://uea.facila.org/>

Dum mia volontula laboro ĉe UEA (sekvo)

Petite de Yves, mi skribis por la n-ro 281 de Normanda Esperanto-Bulteno artikoleton pri mia volontula laboro ĉe UEA en Roterdamo (1977-78). Pro la furora sukceso de tiu artikolo (ĝin legis eble 10 homoj*) mi sentas min devigita daŭrigi la elvokadon.

En tiu tempo komencis aperi kelkaj personaj artikoloj en la revuo *El Popola Ĉinio*.

Ni, okcident-eŭropanoj, taksus ilin «normalaj», sed skribi pri si aŭ eldiri sian opinion en ĉina gazeto internacia estis nove, iel mirige. Tiun fakton rimarkigis al ni nia usona kolego Charles. Li estis la konstanta kongresa sekretario, alidire : KKS (nepre neprononcenda kiel kokoso !).

Charles estis membro de la asocio MENSA kiu konsistas el homoj havantaj altan intelektan kvocienton. Ne nur lia I. K. estis alta, sed ankaŭ lia staturato. Mi estas 1,79 m alta sed tio ne "sendevigis" min levi la kapon, kiam mi kaj tiu Teksasa "giganteto" larĝaŝultra interparolis. Promeni kun tia ulo sur stratoj dense prisvarmataj de homoj estas oportune. Mi tuj klarigos kial.

Tamen por tion fari, mi devas antaŭe rakonti pri la juna japanino, kiu helpis nin en la oficejo de UEA po unu tago en semajno (domaĝe estas, ke mi forgesis ŝian nomon). Ŝia edzo estis portempa reprezentanto de japana firmao. Ili loĝis en Amsterdamo. De tie ŝi kutimis veturi por utiligi libertempon helpante nin.

Kiam lia edzo estis revokita patrujen, ankaŭ la edzino memkompreneble estis flugonta returne. Antaŭ ol forflugi el Nederlando ŝi afable invitis nin ĝui japanajn frandaĵojn en ilia domo. Kelkopo el ni, profitante de tio, ke ili venas en la belan, faman urbon Amsterdamo, unue promenis en ĝi. La alta Charles partoprenis en la promeno. Jen mi klarigas kial tio estis oportuna : tiun tagon li surhavis Stetson-ĉapelon similan al tiuj, kiuj ornamas virajn kapojn en la usona TV-serio Dallas.

Tiel Charles estis la paŝtisto de gregeto, kiu fidele sekvis lian kapovestaĵon tra inter multegaj turistoj. En mia menso ankoraŭ ŝvebas, kvazaŭ kajto,

Teksasa ĉapelo super homkapoj.
(daŭrigota)

Thierry Lelogeais (14)

*La redaktoro energie protestas : minimume 12 homoj, tri katoj kaj 2 verdaj krokodiloj legis ĝin (laŭ enketo de IFOP : Informo Falsa Opinio Papaga)

Dum mia volontula laboro ĉe UEA, de 1977 ĝis 1978 (nova anekdoto)

Mi estis voluntulo, kiam oni decidis traduki en Esperanton la unuan volumon de Asteriks. Tiucele kreiĝis tradukkomitato. Mi ne volis resti ekster la afero. La tradukotaĵo estis apriorie... netradukebla pro multaj vortludoj (kalemburoj, ktp), sed jam ekzistis tradukoj de ĝi en diversaj lingvoj, ĉu ne ? Do la tasko estis supozeble plenumbla. Mi plenumis ĝin kaj sendis plenan tradukaĵon al la komitato. Mi esperis, ke tiuj tiros el ĝi iom da profito. Estas evidente, ke mi ne povas rekonigi precize mian kontribuon krom la dialogo sur la paĝo 41 kaj la nomo de la druido. Elpensis mi la mokajn aludojn pri haroj far' de Asteriks sur tiu paĝo. La nomo de la druido (Miraklomiks) ekŝprucis plej facile en mian menson. Mi proponis, ke la nomo de la vilaĝestro estu Retoriks.

Aŭdante tion, la redaktoro de *Esperanto*, Simo, tuj komprenis kial mi elektis ĝin kaj ekkriis «Ho, ne !

" Retoriko " estas la titolo de libro verkita de Ivo Lapenna (iama prezidanto de UEA). Stakoj da nevenditaj ekzempleroj staris en loko, kiun Simo nomis "fatrasejo". Eble pro tio, ke la ŝerco estis tro privata, la vilaĝestron oni decidis eknomi Moŝtiks. Nu, mi intime plu pensadas, ke retoriko ja estas propraĵo de ĉefoj...).

Thierry Lelogeais (14)



L'association normande a besoin de votre cotisation (10€). Si vous ne l'avez pas encore fait merci d'envoyer votre chèque à notre trésorière Sylvie Caron (adresse en 1ère page) et de signaler si vous souhaitez recevoir le bulletin uniquement par internet. Merci

Liste des cotisants à jour de leur cotisations au 5 mai 2022

BADMINGTON Janine (76) BELIAVA Olga BESNEVILLE Annick (50) BESSIN Véronique (50) CARON Sylvie (76) CHARLES Véronique (14) CORNICE Dominique (14) COTTIN Brigitte (14) DEFRAANCE Josiane (76) DION Cora (14) DUFEU Patrice (76) DUFRESNE Bernard (76) DUVAL Evelyne(76) ECHAPPE Lucette (44) ETIENNE Patrick (50) FERRAND Claude (14) FORTIN Francine (14)GIRARD Véronique (14)GLEMOT Françoise (50) GUEROULT Ginette (76) HUBERT Madeleine (14) JAMES Jean- Pierre (50) LANGEAIS Michèle (14) LECARRIE Auguste (50) LEMARCHAND Pierre (76)LEMELTIER Marcel (Père Marc) (50) LEPREVOST Anne- Marie (61) LOISEL Denise (83) LONGUET Jeanine (14) LEVESQUE Christian (50) MARIEFrançoise (14) MAURAU Barthelémy (27)MEREL Elisabeth (50) MORLIER Christian (14) MULOT Annick (50)NICOLAS Yves (14) PIETTE Marie-Anne (14) QUILLAUD Pierre (34) ROUSSEAU Henri (14) ROUSSEAU Jeanine (60) ROUSSIGNE Simon (14) SAUVAGE Jean- Pierre (14) SENEAL Gérard et Gigi (14) TARLEVE Bertrand (14) THIERRY Marie (75) VERSTRAETEBertrand (14)



Nur unu literon ni ŝanĝis...

Pasintajn du jarojn, la kronviruso malebligis nian projekton bicikli de nia hejmo al la delto de Danubo. Post nia biciklado ĉirkaŭ Francujo somere 2021, ni estis esperanta plenumi tiun vojaĝon ĉi-somere, sed... Danubo dislimas Rumanujon kaj Ukrainujon. Okazas nuntempe tie milito, kelkajn kilometrojn for, ĉe la alia flanko de la rivero, kaj en Nigra Maro. Pro tio, multaj ukrainaj refuĝintoj estas en ĉi tiu regiono, kaj ni ne volas uzi por ni mem la logistikajn rimedojn, kiujn ili nepre bezonas.

Ni do decidis bicikli al alia celo... kaj ŝanĝis nur unu literon : ni ne biciklos al **Danu«b»o** sed... al **Danu«j»o**.

Ni foriros fine de majo kaj revenos meze de septembro, post pli malpli sesmilkilometra kaj centtaga biciklado. Ni traos ses landojn Francujon, Belgion, Nederlandujon, Germanujon, Danujon. Kiu estas la sesa ? Esperantujo, kompreneble !

Ni renkontiĝos kun kiel eble plej multaj esperantistoj.

En Kopenhago gastigos nin esperantistino, kiun ni renkontis ĉar ŝi, kiel mi, partoprenas la kurson de la Londona Klubo ; survoje al Kopenhago, danke al la Pasporta Servo, ĝis nun, ili estas dek du homoj kiuj akceptos nin dum dek ok noktoj. Reen, ni verŝajne ankaŭ tranoktos ĉe kelkaj aliaj bonkoraj esperantistoj.

En Antverpeno, ni renkontiĝos kun aliaj BEMI-membroj, ĉar la saman tagon, kiam ni estos en la urbo, foriros la somera BEMI-karavano.

Reen, ni vizitos Amiĝejo-n, la malaperitan landon, kiu elektis Esperanton kiel nacian lingvon.

Bertrand Verstraete (14)

Pri niaj aventuroj, vi povos legi plu en nia blogo :

<https://cutt.ly/TraEsperantujo> (aŭ alia - sed longa - adreso :

<https://blog-trotting.fr/u/veroniqueetbertand>)



Pri Pasporta Servo : <https://www.pasportaservo.org/>

Pri BEMI : <https://bemi.tejo.org/> kaj <https://www.facebook.com/groups/29591771007>

Pri Amiĝejo : https://eo.wikipedia.org/wiki/Moresnet_neŭtrala


LE 15 OCTOBRE 2022 à DIVES SUR MER



Vous serez accueillis au centre des Tilleuls où l'historien Pierre Coftier nous donnera une conférence sur Dives, cité ouvrière..

Pierre nous emmènera ensuite sur les lieux (boucle d'environ 3kms). Retour au centre pour un repas partagé et visite de la Maison Bleue, chef d'oeuvre de l'Art Brut. Ensuite visite libre du port, du village Guillaume le Conquérant, des Halles.....et pourquoi pas Cabourg par la passerelle ?

Nous vous avons concocté une belle journée que nous détaillerons lors d'un courrier ou d'un bulletin en septembre.



PRENEZ DATE !

Michèle LANGEAIS